



Ek de 'suben-iri' invadu Dekstran randon.




Diag. 3 (Ĝusta kurso 1-2) Nigro unue ŝtonmetu N1, 'suben-iri' (aŭ 'rektanguliĝi'). Ĉi tiam Blanko prave 'sinligas' tri ŝtonojn per B2.


Sekve, Nigro invadu Dekstran randon. Kien ŝtonmetu?



Diag. 4 (Blanka ŝtonaro estas 'sufokita'.) Nigro 'internen-metu' N3! Blanko ne povas kapti ĉi tiun ŝtonon. Kaj Nigro 'tenas metrajton'.



Diag. 5 Kontraŭ B4, Nigro ŝtonmetas N5. Se Blanko preterlasas ĝin, Nigro mortigos la blankan ŝtonaron per N-a. Ĉi tial,...




Diag. 6 Blanko nepre devas respondi per B6 kaj B8. Rezulte blanka teritorio ĉi tie malmultiĝas je 4 poentoj komparante kun tio en diagramo 2.

{paĝo 372 de la originalo}

Kontraŭe nigra teritorio ĉi tie multiĝas je 4 poentoj (punktoj 'a' en diagramo 6).

Do lim-aranĝo N1 en diagramo 3 valoras '8 poentojn da diferenco', kaj estas la plej valora en situacio de la problemo. (B2 en diagramo 3 valoras 6 poentojn.) Cetere N3 en diagramo 4 estas 'unuflanke metrajton-tenanta' por Nigro, kaj oni taksas, ke Nigro rajtas ŝtonmeti ĝin.

Flanke, anstataŭ N3 en diagramo 4, se Nigro 'rampas' ŝtonmetante je du vojojn malsupre de N3, Nigro malsukcesas. Kiel Blanko respondu?



Diag. 7 Kontraŭ N1, Blanko bone singardas per B2 (sur saman punkton al N3 en diagramo 4).

Poste procedos N-a kaj B-b, kaj la blanka teritorio multiĝas je 2 poentoj ol tio en diagramo 6.

{paĝo 373 de la originalo}